nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2025

## ZAMENHOFA TAGO VARIA KAJ KUN AMPLEKSA ĈEESTO

Madrida Esperanto-Liceo kaj Fuenlabrada Esperanto-Ligo kune aranĝis la Zam-tagon en la ampleksa sidejo de ĉi-lasta. La dimanĉon 15an de decembro ekde la 11a horo okazis kelkaj prelegoj: pri origino de la egipta skribo, pri la venontjara IJK kaj aliaj E-eventoj en sudorienta Azio, pri la E-kursoj en UNED kaj pri la preparoj de la Hispana Kongreso en Sorio. Post la komuna tagmanĝo en proksima restoracio, denove en la sidejo, Mario prezentis du malgrandajn spektaklojn: kanton kun gitaro kaj magiaĵon per ludkartoj. Poste ni amuziĝis per grupaj tabloludoj. Dum la manĝo ni nombris 21 samideanojn, sed venis kelkaj pliaj, inter ili du nunaj estraranoj de TEJO: Lucia kaj Adamo.

Por la okazo ni fiksis grandan Esperanto-flagon ĉe la strata pordo de la sidejo.






## NOVA ELDONO DE LA SCIENCA KALENDARO

La Scienca Kalendaro de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC) denove havos esperantan version en la jaro 2025. Memoru ke temas pri kalendaro kiu ĉiun tagon de la jaro memorigas eventon aŭ sciencistON, kun aparta atento al diverseco.

En la momento de eldonado de tiu ĉi bulteno oni ankoraŭ ne publikigis ĝin; ni esperas oficialan anoncon en la dua semajno de januaro. Vi tiam povos ĝin trovi en la retadreso https://digital.csic.es/handle/10261/374870, el kie vi povos elŝuti belan pdf-forman dosieron.

La kalendaro havas ankaŭ tŭiteran konton, kiu ĉiutage informas pri la koncerna datreveno, en la adreso: https://twitter.com/scikalendaro.

**nia voĉo** **januaro 2025**

## INFORMOJ PRI LA PROGRAMO DE LA HISPANA KONGRESO EN SORIO



Kiel ni informis en la pasinta numero, la retejo de la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso 2025, kiu okazos en Sorio komence de majo, jam disponas je plej praktikaj informoj: sidejo, transporto, gastigado, ktp. Nun vi trovos tie ankaŭ informojn pri la programo.

Menciindas la literatura vespero, en kiu oni profitos la gravan rilaton de la urbo Sorio kun literaturo, ĉu per la inspiro al gravaj poetoj (Antonio Machado, Gustavo Adolfo Bécquer, Gerardo Diego) aŭ per la lokaj verkistoj. Oni organizos specialan omaĝon al la soriana poeto María Ángeles Maeso, unu el kies libroj estis eldonita en dulingva eldono, "Vamos, vemos / Ni iras, vidas", tradukita kaj prologita de Miguel Fernández.

Ne mankos muziko en Esperanto, kiu ankaŭ estos malfermita al la urba publiko. Ni povas konfirmi la ĉeeston de JoMo kaj de Kaj Tiel Plu, gravaj ekzemploj de la esperanta muziko.

La programo enhavos aron da prelegoj kaj konferencoj, pri tre diversaj temoj, trejnkunsidojn, kursojn, kaj ankaŭ ne mankos distraj kaj organizaj agadoj.

La adreso estas: https://kongreso.esperanto.es/, kaj tie vi trovos ankaŭ la aliĝilon.

La unua aliĝperiodo kun rabatita kotizo estis ĵus plilongigita ĝis la 15-a de januaro, post la jarfinaj festoj. Profitu la okazon, ĉar jam aliĝis pli ol 70 homoj, kaj rapide rezervu ankaŭ loĝadon kaj transporton, pro la altiraj datoj de la ponto de majo.

## (RE)ALIĜU AL MADRIDA ESPERANTO-LICEO

Januaro estas ja bona momento por aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo, la loka esperantista klubo en Madrido. Se vi jam estas ano, ne forgesu pagi vian kotizon, ĉu en la sidejo ĉu en la konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero de konto: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

Se vi ankoraŭ ne estas ano, memoru ke la kotizo estas nur 12€ jare. Plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

La sidejo denove malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sen aparta programo.

La unuasabata kunveno okazos la 4-an de januaro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com